WIKIPEDIA

Irlanda signolingvo

La **irlanda signolingvo** (angle *Irish Sign Language*, ISL, irlande *Teanga Chomharthaíochta na hÉireann*) estas signolingvo uzata en Irlando. Temas pri la unua aŭ preferata lingvo de proksimume 40 000 surdaj homoj en la Respubliko Irlando. La lingvo utiligas spacon kaj engaĝas movojn kaj aranĝojn de la manoj, korpo, vizaĝo, kaj kapo. Multaj miloj da homoj kiuj estas ne surdaj ankaŭ uzas *ISL*, kiel parencoj de surdaj homoj, signolingvaj interpretistoj kaj tiuj, kiuj havas alian kontakton kun la novzelanda surda komunumo.

La signolingvo iom parencas al la franca signolingvo, sed **tute ne** rilatas al la brita signolingvo, kvankam en la tuta insulo Irlando la angla estas vaste uzata parola lingvo. En Nord-Irlando uzatas kaj la irlanda kaj la angla signolingvoj.

Irlanda signolingvo	
angle Irish Sign Language	
irlande Teanga Chomharthaíochta na hÉireann	
Parolata en	Irlando
Signantoj	ĉ. 40 000
	Lingvaj kodoj
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	sgn-IE
ISO 639-3	isg
Glottolog	iris1235
Angla nomo	Irish Sign Language
Franca nomo	langue des signes irlandaise



Alfabeto de la ISG

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Irlanda_signolingvo&oldid=5142126"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 00:34, 3 apr. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.